

Johann Wolfgang von Goethe,  
Liga kanto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Dum ĉiuj bonaj horoj  
Kun amo, bona vin',  
Eksonu el la koroj  
La kanto en kazin'!  
Kuntenas nin ja Dio,  
Nin kunvenigis li,  
Pro tio harmonio  
Ne mortos tie ĉi!

2. Do ĝoju kun kontento  
Unuanimaj ni!  
Denove en momento  
De kora simpati'!  
Tintigu tuj la glason  
Kun tia bona vin',  
Ne zorgu, nian kason  
Prizorgos la destin'.

3. Ĉu iri en la rondo  
Ne restas kun plezur' ?  
Konservas ni en mondo  
L'emblemon de natur'!  
Por ĉiam niaj koroj  
interkonsentu, kaj  
Pro malserenaj horoj  
Ne ĉesu nia gaj'!

4. Nin Dio benis, vere,  
Liberaj sentas ni,  
Pro iu sperto tere  
Nur kreskas energi'.  
Malhelpos ne kaprico  
Nek ŝajno de afekt',  
Nin ĉiujn, laŭ la vico,  
Imponos nur korekt'!

...

5. Post ĉiu paŝo nova  
Klariĝas viva sort':  
L'unua estas prova,  
La lasta estas mort'.  
Sed ne do timo iel  
Malserenigos nin,  
Fidelaĵ ĉiam kiel  
Nin kreis la destin'!

*Traduko de la Germana poemo "Bundeslied" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

*Arg-86-172 (2004-09-06 05:32:34)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).*